# KOMITATO de 1-a de decembro 2025

Lundon la 1-an de decembro 2025, de la 20a ĝis la 22a30, kunvenis pere de Zoom, la Komitato de Espéranto-France.

[ĉeestas: S = surloke, R = rete pere de Zoom, T = telefone pere de Zoom]

| PERSONA NOMO | FAMILIA NOMO | MALLONG. | KOMITATANECO | ĈEESTAS | SENKULP. | FORESTAS | RAJTIGAS |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Raymonde | COQUISART | RC | Repr. de la membraro | R | | | |
| Régis | FABRE | RF | Repr. de la membraro | R | | | |
| Bruno | FLOCHON | BF | Repr. de la membraro | R | | | |
| Xavier | GODIVIER | XG | Repr. de la membraro | R | | | |
| Aleks | KADAR | AK | Repr. de la membraro | | | X | |
| Michaël-Boris | MANDIROLA | MBM | Repr. de la membraro | R | | | |
| Sébastien | MONTAGNE | SM | Repr. de la membraro | | X | | |
| Marcelle | PROVOST | MP | Repr. de la membraro | R | | | |
| Bruno | ROBINEAU | BR | Repr. de la membraro | R | | | |
| Clément | ROUSSET | CR | Repr. de la membraro | | | X | |
| Victor | SIMONNET | VS | Repr. de la membraro | R | | | |
| Bertrand | VERSTRAETE | BV | Repr. de la membraro | R | | | |
| Jean-Luc | THIBIAS | JLT | Repr. de fed. France-Est | R | | | |
| Pierre | GAUTHIER | PG | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | R | | | |
| Isabelle | NICOLAS | IN | Repr. de fed. Limousin | R | | | |
| Xavier | DEWIDEHEM | XD | Repr. de fed. Hauts-de-France | R | | | |
| Claude | BENSIMON | CB | Repr. de fed. Bretagne | R | | | |
| | | | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | | |
| Thierry | SPANJAARD | TS | Repr. de fed. Provence | R | | | |
| | | | Repr. de FET | | | | |
| | | | Repr. de FKEA | | | | |
| Didier | JANOT | DJ | Repr. de GEE / İLEİ-Francio | R | | | |
| Rémi | DENEU | RD | Repr. de fed. Auvergne | | | X | |
| Briac | MILLON | BM | Repr. de JEFO/ Espéranto-Jeunes | R | | | |

17 ĉeestis el 21, 1 senkulpiĝis, 0 donis povon.
Estas kvorumo (½) voĉoj

0.2 **Elekto de prezidanto kaj protokolanto** 1 min

XG prezidas, MP kaj VS protokolas

0.3 **Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj**

0.4 **Dato de la venonta kunsido** 4 min

- sabata laborkunsido 24a de januaro surloke en la pariza sidejo kaj rete
- dimanĉa komitatkunsido 25a de januaro surloke kaj rete
- BR demandas ĉu estas ebleco por loĝi ĉe parizanoj dum la nokto sabate/dimanĉe ? Vidu la membroliston de la pasporta servo aŭ kontaktu la francilian federacion.

KOMITATO
1-an de decembro 2025

---

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

1.1 **Financa raporto 2023/2024.** **DISKUTO** 5 min
La financa raporto atendas lastajn agojn de Sebastien Montagne por finfini ĝin.

**Bilanco de la kongreso 2025**
Normala kongreso kun profito. La profito estis dividita pro 50% inter Esperanto France kaj Esperanto Nantes.

1.2 **Protokolo de la lasta komitatkunsido** **DISKUTO** 5 min
Neniu komento aŭ ŝanĝo aldonita
UFE-komitato-2025-10-19-tagordo - Google Docs

1.3 **Diskuto pri staĝo de studentino (Chloé) pri sociaj retoj, eksvolontulino en Tuluzo** **DISKUTO** 25 min
daŭro : 6 monatoj maksimume
kosto : proksimume 700 eŭroj monate.
Demando ĉu iuj de Tuluzo povus helpi sekvi tiun staĝon? Mankas nun fortoj en Tuluzo por engaĝiĝi en tiu agado por Eo Francio
Ni bezonas iom da tempo por starigi teamon de almenaŭ 3, 4 aktivuloj por kunordigi tiun temon.
Kian konkretan rezulton oni atendas pri tiu temo?
Aktivi sur sociaj retejoj, kreskigi kaj krei novajn komunikkanalojn, kompetentiĝi pri tiuj, krei socireta planon kiel skemo por evolui. Decidi ĉe kiu socireto ni konsentos agadi.
Ekspekto de XG : interrilato inter la diversaj aktivuloj de Esperanto-France kaj aktivuloj de la diversaj lokaj kluboj por plialtigi la vidon de la agado de la esperantistoj de Francio.
Propono : krei teamon kun kompetentaj homoj aŭ interesitaj homoj. BR demandas ĉu li povas proponi al Maryvonne (jes ricevita). Viktor ankaŭ deziras partopreni la teamon.
Propono de XD : Poste, utilos por la kluboj kaj federacioj havi materialon proponita de Espéranto France kun libera uzo. Iom post iom, pli da materialo povus esti disponebla kaj ĉiu povus uzi/disdoni/publikigi ĉe siaj propraj paĝoj uzante la socian reton kiun ĝi preferas aŭ elektas. La materialo povus esti bildoj, videoj (mallongaj) eldonitaj kaj proponitaj de Esperanto Francio laŭ difinita grafika ĉarto kiu donus homogenecon en la produktado. Tiu propono estas subtenita de Pierre (PG).
Neceso de debato pri moraleco de tiu aŭ alia kanalo. Kion ne elektu? Kie oni eventuale pagu reklamojn?
Ni iru tie kie troviĝas publiko kiun ni celas (DJ, XD, subtenita de TS).

## 2. KONSCIIGO projektoj, (ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

2.1 **Restarigo de laborgrupoj kun lokaj aktivuloj (rete plej ofte)** **DISKUTO** 3 min
XG proponas starigi diskutliston por kontakti la aktivulojn de ĉiuj asocioj pri diversaj temoj kaj agadkampoj.

2.1 **Ĝisdatigo de niaj komunikiloj : faldfolio / logotipo** **DISKUTO** 10 min
Antaŭ lanĉi novan faldfolion aŭ alian materialon por ĝenerala propagando, necesas decidi la novan logotipon de Esperanto Francio.
BF prezentas rezultojn kun 209 voĉdonoj sed tamen atendas pliajn respondojn interalie de junuloj pere de

JEFO. Emmanuel Richard poste povos finpretigi la logotipon.
TS atentigas pri diskutoj en la listoj aŭ Telegramgrupoj kun novaj proponoj kaj variantoj. BF pretas denove alvoki voĉdonojn kun tiuj se TS sendas proponojn al li. Ni celas elekti novan logotipon ĉijare. Do tio devus okazi uzante voĉdonon per reto. La nova enketo povos esti farita pere de Esperanto-Aktiv dum la sekvaj semajnoj.

### 2.2 Lanĉo de trejnad-sesioj — INFORMO 10 min

1- propono de Marc-Olivier Graziani de Lyon (mesaĝo de B Robineau). Li sukcesas havi lernantojn ĉe la surlokaj kursoj post agado ĉe Google.
Eble tiu trejnad-sesio povus okazi dum sabato, la 24a de januaro per reto kaj en la sidejo. Tiu trejnad-sesio povas esti atingebla de la lokaj kluboj.
2- BR sekvis trejnad-sesion pri instruado de Esperanto. Denis Keefe faris prezentadon dum ¾ horo. Li klarigis ke necesas pripensi klare la celojn de la grupo kiu deziras instrui (la celita publiko, la nombro, la loko, la metodo…). Ankaŭ li povus helpi nin. Eble li povos prezenti tion al nia membraro. XG kontaktos lin por demandi ĉu li povus proponi retan trejnadon kaj/aŭ prelegvojaĝon.

### 2.3 Okazinta Salon de l'éducation — INFORMO 10 min

3 tagoj de ĉeesto : 3 adresoj kolektitaj. Pli da kontakto kun la aliaj ĉeestantaj budanoj ol kun la studentoj.
Ĉu estas aliaj salonoj pli interesaj por ni ? Kiel aĝaj estis la studentoj ? Inter 14 kaj 17.
Kalendaretoj estis disdonitaj. La studentoj tute ne venis pro elekto de la venontaj studoj. Ili tute ne konis la vorton kaj la lingvon Esperanto. Do estas okazo por prezenti la lingvon.
Ĉu indas plu ĉiujare partopreni tiun kostan salonon ?
BM: ni devas esti realisma pri la homfortoj. Venis junuloj sed homoj en tiaj salonoj ne serĉas novajn lingvojn. Eble prioritatigi aliajn salonojn.
Debato por la venonta jaro : ĉu estos junuloj por prezenti Esperanton al la junuloj dum tiu salono kaj tiel pli efike alogi ilin?

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

### 3.1 *Le Monde de l'Espéranto* — DISKUTO 2 min

Rezultoj pri la lastaj kunvenoj de la teamo, la dungo de Céline, la planita enhavo de la venonta numero. Nova numero povas esti preta antaŭ la venonta kongreso. Jam 3 kunvenoj okazis.

### 3.2 Kongreso 2026 — DISKUTO 10 min

en Hérouville Saint Clair (apud Caen)
Peter Weilde prezentos sian instru-metodon dum la kongreso.
Prezentado de la unua propono sendita al la estraro. Venontaj kunvenoj kun la urbestro okazos la 9an kaj 10an de decembro pri la finaj detaloj pri la salonoj, la manĝejoj kaj manĝoj.
Ankoraŭ kelkaj detaloj necesas esti traktitaj pri la antaŭa kongreso kaj la postkongreso.
La unua bulteno estos disponebla je la 15a de decembro. La aliĝilo bezonas laboron de SM. Alia propono estas uzi helloasso-n. La programo estas kompleta kaj definitiva kaj RC transsendos ĝin morgaŭ.

### 3.3 Kongresoj 2027 kaj 2028 — DISKUTO 5 min

2027 : la tereno estas malfacila por la grupo de Marsejlo kaj La Ciotat. Propono de la Grotte Cosquer kiu proponas la salonon je la sumo de 20 000 eŭroj.
2028 : XD kaj la loka grupo deziras organizi la kongreson en 2028. La ĝenerala asembleo de la norda federacio kiu decidos tion kunvenos dum marto 2026.

### 3.4 Projektoj pri Arkivoj : inaŭguro de ekspozicio en Varsovio — INFORMO 5 min

Invito partopreni al la komitatanoj kiu povas, sendita de PDG. VS partoprenos. JLT havas sian edzinon en Varsovio, pripensas pri oportuneco. Necesas aliĝi antaŭ la inaŭguro (informi pri sia veno). La oficiala inaŭguro okazos en la angla. Kiuj aliaj homoj helpis en tiu laboro pri Peraire kaj havos intereson partopreni ?
XG pensas pri Nicola Raymond kiu kune kun Régis Fournier multe helpis al la projekto. Eo France povos finance helpi pri vojaĝkostoj.
PDG proponas ke ni komuniku sur nia retejo kaj en niaj komunikiloj.

3.5 **Starigo de teamo pri prelegvojaĝoj** **DISKUTO** 5 min
kun naciaj kaj regionaj respondeculoj
Ĉu Dennis Keefe estus interesata partopreni iun prelegturneon ? En Greziljono ?
RF ne havas precizan informon pri la ĉinoj kiuj planas viziti Parizon. LPI skribis al la grupo por proponi al la C2 parolantoj partopreni vesperon en la sidejo. Tiu grupo vizitos plurajn eŭropajn urbegojn do ne restos longe en Parizo.

3.6 **Rilatoj kun la federacioj kaj la lokaj grupoj** **DISKUTO** 10 min
Ni komencis studi la eblecon uzi la reton "Eventa servo" por anonci ĉiujn eventojn organizitajn de la lokaj grupoj por poste afiŝi la enhavon ĉe la retejo de Esperanto Franc. Momente SM ne sukcesis elŝuti la datumojn.
Se tio okazos, ni informos ke la informo estu, en Eventa servo, dulingva. Tio ebligos samtempe informi al Esperantistoj internacie pere de eventa servo por ke ili vizitu la lokajn klubojn dum vizito en Francio, kaj al novuloj en Francio pere de la retejo de Esperanto-France atingebla franclingve.
TS interesiĝas pri la ebleco por la retejo de Esperanto Provenco.

3.7 **Virtuala Kongreso de UEA** **INFORMO** 3 min
De la 4a al la 7a de decembro. Raporto pri tiu VK estos farita de RC por la venonta numero de Le Monde de l'Esperanto.

3.8 **UK 2026 en Graz Aŭstrio** **INFORMO** 1 min
Unua aliĝperiodo finiĝis fine de Novembro.

3.9 **Okazonta Mediteranea Esperanto-Semajno 2026** **INFORMO** 3 min
De la 14a ĝis la 21a de marto, okazos en Les Issanbres la tradicia MES. Kutime, inter 50 kaj 80 partoprenantoj.
Pli da detaloj aperas sur la retejo de Esperanto-Provence

## 4. KAPABLIGO (kursoj, ekzamenoj..)

4.1 **Ekzamenoj** **INFORMO** 1 min
Dum la nacia kongreso en Hérouville Saint Clair..

**4.2 Metodo 12** **INFORMO** 1 min
daŭre en prilaboro.